

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 9-a parto

Mahatma Gandhi forlasas Svislandon

Claude Gacond, 273-a radioprelego, 1969.01.01 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

El Berno, kie tiu radio-prelego estis registrita antaŭ kelkaj tagoj, kaj el Adelboden, kie ni nun gvidas la dekduan esperantistan ski-ferion, ni disaŭdigas niajn nov-jarajn bondezirojn al ĉiuj niaj aŭskultantoj.

A.- Dum pluraj semajnoj ni prezentis al vi la traveturon de Gandhi en Svislando en decembro 1931. Ni provis prezenti al vi la profundan kredon de Mahatma Gandhi en la forto de la Vero. Ni ĉerpis el la memor-gazeto de Romain Rolland, ĉe kiu Gandhi restadis en Territet apud Villeneuve kaj Montreux.

Cl.- La vendredo 11-a de decembro 1931 alvenis. Ĝi estas la forirtago de Gandhi. Por lasta interparolo la hinda gvidanto vizitas la francan verkiston. Ili babilas pri plej diversaj temoj, kvazaŭ ili dezirus nombri la paroltemojn, kiujn ili havis apenaŭ la temon ektuŝi.

A.- Sed ili revenas al la ĉef-temo : la Vero. Romain Rolland ricevis demandojn. Li legas ilin, kaj Gandhi respondas. Ĉar Gandhi en Lausanne diris, ke por li la Vero estas Dio, oni demandas, kion li nomas Dio ? Ĉu lia Dio estas spirita personeco, aŭ forto, kiu regas en la mondo ?

Cl.- Gandhi respondas : « *Dio ne estas persono. Ĝi estas neŝanĝebla leĝo. Kaj ĉi leĝo, kaj tiu, kiu ĝin faras estas nur unu. En la kutima vivo ni komprenas sub la esprimo leĝo la librojn pri leĝo. Sed ĉi tie, kiam mi parolas pri leĝo, mi diras : la vivanta leĝo. Tio estas Dio. Kaj tiu leĝo ne ŝanĝiĝas. Ĝi eternas. Ĝi ne estas persona Dio, kiu varias kun la cirkonstancoj en movo. Dio estas eterna principo. Kaj pro tio mi diras, ke la Vero estas Dio.* »

A.- Post tiu lasta renkonto Romain Rolland akompanas sian amikon Mahatma Gandhi kaj ties sekvantaron al la stacidomo en Villeneuve. La vetero malvarmas. Dum la aŭtomobiloj transportas la kelkajn pakaĵojn kaj la virinojn, Gandhi, kiel kutime, iras piede. Malgraŭ la malvarmo li estas duonnuda sub sia kotonŝalo. Enmane li tenas sian horloĝon.

Cl.- En la stacidomo homsvarmo kreskas ĉirkaŭ ili. Scivolema sed simpatia publiko. Oldulino venas premi la manon de la hinda gvidanto.

A.- Edmond kaj Yvonne Privat forveturas kun la hindoj. Ili akompanas ilin ĝis la enŝipiĝo. Kaj la neeviteblaj britaj kaj svisaj policistoj ilin postsekvas por observadi la strangan fakiron.

Cl.- Nun finiĝas nia ĉerpado el la memor-ĵurnalo de Romain Rolland. La geaŭdantoj, kiuj legas la francan povos retrovi, kun multe pli da informoj, tiujn rakontojn en la libro *Inde de Romain Rolland*, eldonita en 1951, eldonejo Edition Vineta, Paris kaj Lausanne.

A.- La konkludo de tiu interesa traveturo de Gandhi en Svislando apartenas al Edmond Privat. Ĝi troviĝas en la libro ĵus eldonita de Stafeto : *Vivo de Gandhi*. Tiu libro estis vendita por la unua fojo en Svislando okaze de la Jubileo Mahatma Gandhi okazinta en La Chaux-de-Fonds la 23-an kaj 24-an de novembro 1968.

Cl.- Dum la venontaj elsendoj ni aŭdigas al vi erojn el la prelegoj prononcitaj dum tiu grava manifestacio. Interalie la venontan semajnon vi povos aŭdi la voĉon de Yvonne Privat.

A.- Por reveni al la libro *Vivo de Gandhi* de Edmond Privat, ĵus eldonita de Stafeto, ni legos al vi paĝon, kiu estas ege pensiga. Ĝi montras, ke la geedzoj Edmond kaj Yvonne Privat estis absolute disponeblaj. Dum la veturo tra Italio subite Gandhi ilin invitas enŝipiĝi por ilin akompani ĝis Hindio. Ili respondas jes. Aŭdu :

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 9-a parto

Mahatma Gandhi forlasas Svislandon

Claude Gacond, 273-a radioprelego, 1969.01.01 & 04

Cl.- « *Romain Rolland deziris, skribas Edmond Privat, ke ni akompanu Gandhi kaj liajn amikojn ĝis Romo por eviti malagrablaĵojn kun la tiama faŝista registaro. Tion ni faris kun granda plezuro, kaj en la vagonaro Gandhi demandis nin :*

A.- « *Kial vi ne vizitus Hindion. Ni vojaĝas kvaran klason kaj dormas sur la ferdeko. Tia bileto kostas nur dek funtojn.* »

Cl.- *Dum la nokta vojaĝo al Romo mi diskutis la aferon kun mia edzino, ankaŭ kunveturanta, kaj ni decidis riski tiun interesan aventuron. En Romo ni akiris la necesajn permesojn kaj du tagojn poste ni ĉiuj enŝipiĝis kune sur la malnovan italan ŝipon **Pilsna** ĝis Bombaĵo.*

A.- Edmond Privat dauriĝas : *Tri semajnojn ni tiamaniere pasigis kun Gandhi tage kaj nokte, ĉar ni ĉiuj dormis apude sur la ferdeko kiel migrantaj laboristoj, envolvitaj en ĉevalaj kovriloj aĉetitaj malkare en Romo.*

Cl.- *Pli instruan vojaĝon oni ne povus imagi.*

A.- *Vi konas la proverbon, ke faman homon oni prefere ne vidu tro proksime.*

Cl.- *Pri tiu ĉi tute male, ĉar li estis eĉ pli granda proksime ol malproksime. Bonkora, gaja, ridema, praktike zorgema pri la sano kaj komforto de ĉiuj kunuloj, li estis kvazaŭ avino ĉarma kaj amika, ĉiam atentema je ĉiuj detaloj kaj kompreneble ankaŭ pri profundaj temoj ni diskutis admirante lian saĝon.*

A.- *Kun li vojaĝis lia filo Devadas, pli poste ĉefredaktoro de **Hindustan Times** ; Miraben, hinda nomo de Miss Slade, la filino de angla admiralo, kiu helpis lin en la lernejo Dabarmati ; liaj du sekretarioj, la poeto Pyarelal kaj la juristo Mahadev Desai, ambaŭ rimarkindaj junuloj ; Ŝam Rao, kristana pastro, kaj Bernard, cejlona studento.*

Cl.- *Ni formis tre gajan familion.*

A.- *Gandhi ŝatis moralajn eksperimentojn.*

Cl.- *Li volis provi, ĉu ni elportus la ioman malkomforton de tiu tre malkara demokrata vojaĝo.*

A.- *Kiam la kapitano permesis, ke ni uzu la ŝipan banejon, li konsentis, ĉar pureco gravas, sed kiam oni permesis, ke ni uzu laŭvole la triaklasan salanon por legi ĵurnalojn, li tion malkonsilis :*

Cl.- « *Ni atentu - li diris -, ne forperdi la moralan profiton de vera vojaĝo en kvara klaso, ne komedia aŭ duona, sed honesta.* »

A.- *Tiu citado el ĉapitro de la libro Vivo de Gandhi ĵus eldonita de Stafeto eble instigos vin aĉeti tiun novan verkon de Edmond Privat.*

Cl.- *Kiel okazis por Aventuroj de pioniro, la manuskripto de Vivo de Gandhi konsistas el la teksto de nelongaj prelegoj en esperanto, kiujn nia radio disaŭdigis siatempe.*

A.- *Inter vi eble kelkaj aŭdis tiujn elsendojn, en kiuj Edmond Privat rakontis pri siaj kontaktoj kun Gandhi. Ili skribu pri siaj impresoj, kaj ni aŭdigos ilin.*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!*

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch

Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012